

Zpravodaj

SEKCE MLÁDEŽE ČESKOSLOVENSKEHO ESPERANTSKOHO VÝBOTU


Jarkolekto II.

speciala numero

4/67

Karaj geamikoj,

konforme al la Laborplano '67 de Junulara Sekcio de la Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato, ni ĝoje invitis al la Internacia Junulara Esperanto-Seminario funkciulojn de la internacia junulara Esperanto-movado.



Ĝi estis ne nur unika ebleco por amika renkontiĝo meze de freŝa naturo, sed ankaŭ bona okazo por diskuti komunajn problemojn kaj interŝanĝi spertojn.

Vizito al Ĉeĥoslovakio (kiu nun fariĝis nova celo por turistoj) samtempe ebligis al partoprenintoj ekscii pli multon pri ĝiaj historio, popolo, kulturo, ekonomio ktp.

La seminario estis certe unu el la plej malmultekostaj E-aranĝoj. Vidu: plena 8-taga restado, inkluzive ĉiujn programerojn, kostis 280 Kčs (egalas al 17,4 us. dol.)

La kampadejo Turyři, somera restadejo, estas situata en bela arboriĉa pejzaĝo apud lago, fakte sur la teritorio de estintaj orminejoj. La distanco de Turyň al la ĉefurbo Praha estis nur 30 km. Oni loĝis po kvar personoj en agrablaj lignaj kabanoj kaj bonguste manĝis kvinfoje tage.

Krom altnivelaj prelegoj fare de eminentuloj, komunaj diskutoj kaj amuzado ĉe vesperfajro, la organizantoj preparis interesajn ekskursojn. Dum libera tempo oni povis okupi sin pri diversaj sportludoj: retludo, tabloteniso.

La seminario fariĝis vere universala kaj lingve bonnivela tribuno do funkciuloj – reprezentantoj de 11 naciaj junularaj E-organizaĵoj.

La restado en Ĉeĥoslovakio, por eksterlandanoj agrabla kaj utila, grave influis kaj nian enlandan kaj la internacian junularan E-movadon.

Ni dediĉis la seminarion al la 80-jara jubileo de Esperanto kaj al la Jaro de Internacia Turismo!

La Estraro de
Junulara Sekcio de ĈSE

ORGANIZINTOJ

(estraranoj de JS ĈSEK)

Karel Bartošík
Marie Drašnarová
Jana Haklová
Marie Jirásková
Jana Maierová
Jan Nevan
Mikuláš Nevan
Jaroslava Nevanová
Bohumil Slezák

EKSTERLANDAJ PARTOPRENINTAJ

Belgujo

Agnes Geelen,

Britujo

Alan Billington

Francujo

Françoise Bourdier
Claude Nourmont

Germanio (GFR)

Erika Schneider
Marie-Luise Steimle

Jugoslavio

Ivo Osibov
Milutin Jovanović

Nederlando

Jasp Düys

Pollando

Krystyna Grzębowsa
Andrzej Grzębowski

Rumanio

Elena Balanescu

Sovetunio

Igor Drulj

Svedujo

Jan Milid

PRELEGINTOJ

Jana Cíhová
Vuk Echtner
Drahomír Kočvara
Karel Kraft
prof. Miloš Lukáš
Jaroslav Mařík
inĝ. František Sviták

ĈEĤOSLOVAKAJ PARTOPRENINTOJ

Zdena Beránková
Olga Bohunová
Magda Dašková
Miluše Fránková
Regina Geblová
Peter Holba
Jiřina Jandíková
Jiří Kolečka
Marta Lukáčová
Marie Oplerová
Josef Píč
Richard Siepl
Jitřenka Sittová
Ludmila Soběhartová
D-ro Andrej Valjan

GASTOJ

Anna Bárochová
Josef Brom
Pavel Červenka
Miroslav Fuchs
Eugen Garaj
Ladislav Kaniuga
Jana Kňourková
Jindřich Ondráček

La ideo organizi internacian junularan Esperanto-seminaron venis post preskaŭ unujara agado enlanda kaj eksterlanda. En la jaro 1956 pli ol dudeko da prahaj gejunuloj vizitis kaj partoprenis kelkajn internaciajn aranĝojn kaj de tio importis sufiĉe da spertoj, proponoj kaj ideoj. Pro tie estis ĝoje akceptita propono de la tiama prezidanto de la Distrikta komitato de ĈSM Eugen Garaj okazigi la aranĝon en la somera junulara kampadejo Turyň en Jílové apud Praha. Post aprobo de kompetentaj instancoj kaj oficialigo de la afero en koncernaj medioj oni ellaboris detalan projekton kaj ĝin publikigis.

Preparlaborojn por la seminario gvidis ĉiuj estraranoj de nia Junulara Sekcio, paralele kun konstanta plenumado de ceteraj taskoj kaj devoj.

Ili presigis specialajn skribpapirojn kaj kovertojn, eldonis interesan prospekton kaj oĉ utilan insignon. Informkampanjo estis direktita precipe al Eŭropaj TEJO-Sekcioj, al iom grandaj E-gazetoj kaj ĵurnaloj. Efike helpadis ankaŭ frekventistoj de la printempaj rapidkursoj de Esperanto, kiuj dum du-tri antaŭseninariaj tagoj akompanis alvenantajn eksterlandanojn.

La okan de julio 1967 renkontiĝis en la Junulara Esperantista Klubejo en Praha ĉirkaŭ kvardek junaj esperantistoj el 12 landoj. Aparta aŭtobuso veturigis nin al nia seminariejo. Bonveniga vespermanĝo kaj sekvanta interkona amuzvespero ege kontribuis al kresko de amikeca medio. Dimanĉe, nefavora vetero neniel influis la inaŭguron fare de s-ano Mikuláš Nevan, prezidanto de JS de ĈSEK. Poste salutis ĉiujn parteprenantojn s-ano Šlechta, gvidanto de Distrikta Komitato de ĈSM. Li i.a. esprimas opinion, ke unu el la rimedoj aŭ manieroj por defendi la pacon kaj batali por interkompreniĝo estas laboro por kaj per Esperanto. Per la frazo "Vivu la internacia lingvo Esperanto" li finas, dezirante al la seminario multajn sukcesojn.

En la nomo de TEJO alparolas la ĉeestintojn s-ano Ivo Osibov, kiu dankas por la invito al Ĉeĥoslovakio kaj esperas, ke ankaŭ la rezulto de tiu ĉi seminario kontribuos al baldaŭa organiziĝo de junulara E-movado en Ĉeĥoslovakio.

Poste prenas la parolon s-ano J. Mařík, laŭkomisie transdonante salutojn de la Estraro de ĈSEK. Lasta en la vico de la oficialaj parolantoj estas s-ano J. Ondráček, komitatano de la Esperantista Klubo en Praha. Sekvas prezentiĝo de la reprezentantoj da unuopaj landoj. Kaj poste oni disaŭdigis precizan programon por la tuta seminaria semajno. La vespero estis dediĉita al gitara muziko kun originalaj aŭ tradukitaj kantoj.

Unua preleginto fariĝis lunde profesoro Lukáš, kies temo pri historio, kulturo kaj socia strukturo de nia lando vekis interesan de ĉiuj. Mallonga ekskurso en la ĉirkaŭaĵon subtenata de la pliboniĝanta vetero eĥigis bonhumoron. Vespera diskuttemo "Jaro de la Internacia Turismo" rilatas al la eblecoj, kiujn donas la internacia lingvo. Nur unu eron de ĝenerala problemaro tuŝis dum sia marda prelego s-ano K. Kraft, preleginta pri juĝekulpaj gejunuloj. Oni poste virgle diskutis pri edukeblecoj kaj plibonigado de tiuj difektitaj personoj. Bedaŭrinde, ke limigita tempo ne sufiĉis por multaj demandoj. Rapida enstomakigo de la tagmanĝo apenaŭ sufiĉis por ĝustatempa atingo de trajno, per kiu ni veturis al Praha.

Antaŭe konfirmita vizito al la Ĉokoladfabriko Modřany ne okazis pro aroganta kaj malafabla konduto de ĝia direktoro. Tio estis malfacile klarigebla al niaj el eksterlandaj gastoj, sed la aferon savis estroj de la proksima bierfabriko Braník, kie

oni senprokraste ebligis al ni ekskurson. Faka gvido kun kutima gustumado de biero efikis bone kaj refreŝiga akvo de moderna baseno en proksimeco kontentigis eĉ postulemulojn.

Merkrede la 12-an de julio estis tute dediĉita al vizito en nia ĉefurbo Praha. Sperta gvidistino de la Urba Informa Centro, s-anino Cíhová, montris al ni antikvaĵojn de Praha-Kastelo, iaman hebrean kvartalon, malnovan Urbodomon ktp. Neatendite ni ankaŭ renkontis s-anon Šustr, ĉefdelegiton de UEA, en lia E-biblioteko. Individue pasigita posttagmezo donis eblecojn por diversaj aĉetoj, privatvizitoj k.a. Post vespermanĝo en studenta manĝejo ni komune vizitis ĉarman malnovan tradician bierejon Ĉe Bonaparto, kie oni konkursis en la kvanto de eltrinkita biero. Noktomeze sen lumiloj irante al la kampadejo ni ĉiuj sentis nin bone.

Ĝeneralajn problemojn ligitajn kun nia movado pritraktis referatoj de s-anoj Echtner, Mařík kaj Sviták, ĵaŭde antaŭtagmeze. Post la tagmanĝo, ĉeĥoslovakaj partoprenintoj aranĝis malgrandan kunvenon, dum kiu estis preparolita i. a. la nuna situacio de la movado konsidere al la perspektivoj. Distran vesperon gvidis s-ano Kočvara, kies anekdotoj, societaj ludoj kaj aliaj amuzaĵoj ridigis la tutan publikon.

Junulara Esperantista movado enlanda kaj eksterlanda estis la ĉefa temo de vendreda programo. Speciala atento estis direktita al reciproka kunlaboro inter unuopaj TEJO-Sekcioj. Nova pervagonara vizito al Praha kulminis per vespera spektaklo de Laterna Magica. Por plezurigi la prahan esperantistaron, havante ankoraŭ iom da tempo antaŭ la forveturo al Turyň, ni haltis en la Esperantista Klubo en Praha. Porta aplaŭdo salutis nin en la klubejo.

La ĉefa sabata olazaĵo estis intervjuado de redaktorino de "Mikroforum" (la plej populara junulara radio-programo) de eksterlandaj delegitoj. Ĝi estis nur parto de la publika informado, ĉar almenaŭ kelkaj ĵurnalistoj kaj redaktoroj speciale venis por ĉerpi informojn. Preparo de vespera programo kaj kolektado de ligno por vesperfajro postulis ĉies iniciaton. Granda vesperfajro kaj diversspeca amuzprogramo gvidita denove de s-ano Kočvara postlasis belajn rememorojn. Mankis nek biero, nek kutimaj kolbasoj. Unuan premion de la plej ĉarma ĉeestantino "Miss IJES '67" gajnis f-ino Regina Geblová.. Pro densa pluvego ni daŭrigis la programon ĝis mateno en la provizora klubejo.

La lastan tagon, dimanĉon la 16an de julio, oni dediĉis parte al likvido de nia kampadejo. Fine la adiaŭan ceremonion sekvis aŭtobusa reveturo al Praha. Kun sinceraj dankesprimoj forveturis la partoprenintoj al siaj hejmoj.

Se ni retrospektive pritaksas la Seminarion, ĝian preparadon, programon kaj fermon, ni povas diri, ke ĝi plene sukcesis.

Varia smajno kun multaj seriozaj laj amuzaj elementoj allogis ĉiujn. Enhavoriĉaj prelegoj kaj viglaj diskutoj rezultis en ambaŭflanka kontentiĝo. Krom tio niaj eksterlandaj gastoj pliprofundigis siajn konojn pri Ĉeĥoslovakio. Per sia formo kaj ideo enhavo la Internacia Junulara Esperanto-Seminario montris vojon de novaj eblecoj kaj perspektivoj. Taksante la rezultojn oni konkludis kaj esprimis sin pozitiva. Vigla kaj utildona interŝano de opinioj estis alte aprezita de ĉiuj seminarianoj.

Ĉi tiu aranĝo denove envicigis la ĉeĥoslovakon junularan E-movadon en

internacian forumon. Nuna tasko estas apliki kaj utiligi pozitivajn rezultojn de la Seminario en niaj estonta laboro kaj agado.

Ne tro ofte okazas, ke nian junularan sekcion kontaktas reprezentantoj de ekstereŭropaj andaj sekcioj de TEJO. Pro tio la intereso de niaj meksikaj samideanoj estas vere unika. Letero etas reskribita laŭ originalo - ne koretita,

Meksiko la 4an de Julio, 1967

Al la Organiza Komitato kaj
Partoprenantoj en la
Internacia Junulara Esperanto Seminario.
Jílové apud Praha
Ĉeĥoslovakio

Karaj gesamideanoj:

La Esperanta Meksika Junularo en la neebleco partopreni persone la Seminarion, sendas siajn plej varmajn salutojn kaj bondezirojn por ĝia plena sukceso.

Ni tre bedaŭras ne ĉeesti tiun ĉi renkontiĝon kiu certe enhavis laŭ la programo, ege interesajn aferojn, pli gravajn por ni kiuj ekkomencas la organizadode Junulara Grupo.

La nuna situacio ĉe nia lando, okaze de la celebrado de la XIX Olimpiko, graviĝas ankoraŭ pli la laborojn de nia grupo, kaj la fakto pri la okazo de kulturaj manifestacioj en ĝi pligrandigas la laborkampon por la disvastigo de nia lingvo.

Pri tio ni subtenas rilatojn kun la organizo kiu realigos tiun ĉi aferon, la "Nacia Instituto de la Meksika Junularo" kiu jam kunlaboris kun ni subskribante la proponon al la UN, invitante oficiale S-ro Tibor Sekelj viziti nian landon, kaj aliajn malpli gravajn aferojn. Ili ellaboras nuntempe la programon, kaj kiam ĉio estos preta, transdonos al ni la nomoj de ĉiuj Landaj Organizoj kiuj ili invitos partopreni en tiu ĉi kultura Olimpiko, por ke ni petante la kunlaboradon de UEA, TEJO, IOE kaj ĉiuj Landaj Organizoj povos inviti ilin lerni Esperanton por pli bona interkompreno dum la Olimpiko. Tio ĉi ŝajnas esti aranĝata tre malfrue, tamen ni pensas ke ĉiu paŝo en tiu ĉi tereno malfermos al ni novajn laborkampojn, kaj ke se ni realigos iom el niaj planoj, tio estos demonstracio de vera reciproka internacia kunlaborado kiu en tiu ĉi grava internacia evento, evidentigos la realeco de nia lingvo, kiel solvo al la lingva diverseco. Tial submetante je via juĝo tiu ĉi nia entrepreno ni antaŭpetas vian kunlaboradon por realigi tiu ĉi nia komuna celo, tio estas la uzado de Esperanto en ĉiuj internaciaj renkontiĝoj.

Dezirante konatiĝi iom el la belsonoco kaj utileco de nia lingvo kaj samtempe sendi mesaĝon el Meksiko al la Tutmonda Esperantistaro ni

decidis fari diskon kun meksikaj kanzonoj, el kiu mi sendas al vi ekzempleron por ke vi aŭskultante ĝin flugu mense al tiu ĉi malproksima lando Meksiko.

Dezirante ĉion bonan en tiu ĉi Seminarion kaj esperante novaĵon pri ĝi kaj semtempe atendante viajn konsilojn pri nia "Sporta Movado", varme salutas vin, viaj Meksikaj samideanoj.

sincere via,

Margarita Nájera p. m.

Karaj gesamideanoj,

vere mi devas gratuli al la rezulto do via laboro kies kulminacio estis bone videbla dum IJES. La organizaj aferoj pruvis ke ni ĉiuj provis fari la programon de la seminario vere riĉan kaj ni povas diri, ke vi sukcesis. Kompreneble, ĉiam oni povas vidi mankojn, sed ĉi-tiu seminario estis fakte la unua organizaĵo de junularo en nia lando. Mi estas certa, ke oni atingis la celon. La partoprenintoj denove konvinkiĝis, kiel Esperanto estas utila kaj bezona. Ne ekzistas lingvaj problemoj se ili parolis kun svedo, nederlandano, francinoj, germaninoj, ruso, jugoslavo, rumanino - ĉiuj sentis sin kiel hejme, ĉar la medio estis familieca.

Mi dankaj al vi ne nur en mia nomo, sed ankaŭ en la nomo de novaj amikoj esperantistoj, de novaj membroj de nia Ĉeĥoslovaka Esperanto-familio.

Jitka Sittová, Brno

TELEGRAMOJ... TELEGRAMOJ... TELEGRAMOJ...

14. 7. 1967

Sorry not to be able to send our representative stop best regards for all participants stop International Union of Students

12. 7. 1967

Bonan sukceson deziras al IJE Courtois kaj JEFO stop Bonan restadon al niaj reprezentantoj.

Karaj geamikoj!

En la nomo do Pola Esperanto Junularo ni korege dankas pro la invito al Via Internacia Junulara Esperanto Seminario.

Kvankam en Ĉeĥoslovakio ni estis jam pli ol dekfoje, ni estas certaj, ke ni ĉiam partoprenos Viajn valorajn, bonaranĝitajn interesajn junularajn aranĝojn. Certe kunlaboro inter PEJ kaj Via Junulara Sekcio ankoraŭ pli interesa estos kaj pli deziras al Vi multajn porosperantajn sukcesojn.

Andreo Grzębowski
Krystyna Grzębowska
Bydgoszcz, Pollando

La atmosfero de la Seminario estis ege agrabla, la diskutoj interesaj kaj profitolenaj, kaj la biero abunda kaj bona. Gratulojn kaj dankojn multajn al la senĉese laborantaj organizantoj!

Claude Nourmont
reprezentantino de STELO
Aix-en-Provence
Francio

La afableco, senteblo dum la tuta Seminario, kaŭzos, ke mi decidis kiel eble plej rapide reveni en vian landon.

Jaap Düys
Nederlando

Estis por mi grandaj plezuro kaj ĝojo partopreni la IJES en Jílové invite de la Ĉeĥoslovaka E-junularo kiel reprezentanto de TEJO, kiu aŭspiciis ĝin. La lingvonivelo kaj la sperto antaŭa de la partoprenantoj donas al ni esperon, ke la Seminario prezentis por ili pruviĝon de la klopodoj faritaj kaj instigon por ankoraŭ pli viglaj aktivecoj estonte en la lokaj grupoj kaj en la landa movado.

La junularo estas nur parto de la socio, la landa kaj la monda. Same la esperantista junularo. Ĝi vivas en la socio kaj sentas ĝiajn problemojn. Ĝi devas trovi sian lokon en tiu socio kaj partopreni ĝian vivon. Ne nur partopreni, sed ankaŭ influi ĝin. Tiun ideon enhavis la diskutoj de la Seminario. Ju pli la partoprenintoj de la Seminario sukcesos realigi en sia laboro tiun ideon, des pli grandajn sukcesojn kaj rekonon ilia laboro rikoltos. Tute certe TEJO povas esti kontenta ĉar ĝi aŭspiciis tiel utilan kaj tiel amikan renkontiĝon.

Mi estas certa, kiam mi (aŭ alia heredanto de mia trono) venontfoje vizitos Ĉeĥoslovakion, ke mi trovos jam tute maturajn fruktojn de la ĵus finiĝanta Seminario.

Ivo Osibov
prezidanto de TEJO
Jugoslavio

Humora travivaĵo ĈE BONAPARTO

Strangaj angloj_!

Ĉi tie mi volas rakonti pri unu el multaj gajaj momentoj, kiuj okazis dum la ekskursoj en Praha. Laŭ deziro de la eksterlandaj partoprenantoj, ni vizitis inter aliaj malnovan, historian trinkejon, ĉar kiel konate, nia biero estas la plej bongusta en la mondo.

Tiun ĉi aferon ni antaŭe priparolis kun la ĉefkelnero de malgranda, ĉarma bierejo "Ĉe Bonaparto" en antikva parto de la urbo, kiu promesis "ĉion aranĝi", tio signifas trovi liberan lokon en la plenŝtopita biersalono. Tamen post nia alveno mankis ankoraŭ kelke da seĝoj. Tiam la kelnero petis grupeton de apudsidantaj gejunuloj: "Bonvolu pli dense kunsidiĝi, mi bezonas por niaj anglaj gastoj kelkajn seĝojn." Malkontente, kun multaj parolaĉoj ili fine disponigis las postulitajn aĵojn. Dume ni mendis ŝatatan bieron kaj baldaŭ ekestis vigla babilado, diskutado kaj eĉ kantado. La ĉirkaŭa publika scivoleme rigardis nin, klopodante deĉifri la enhavon de niaj vortoj. Laŭvide la de ni uzata lingvo ne konformis al ilia imago pri la angla. Unu kuraĝulo laŭvoĉe kaj energie riproĉis: "Mi konas pli malpli la anglan lingvon, sed tio, kion mi aŭdas, ne estas ĝi! Vi mensogis al la kelnero!"

Kiel savi tiun ĉi tiklan aferon? Du-tri-minuta paŭzo naskis ideon. Telegrafstile ni informis nian amikon el Londono, Alan Billington, kaj petis, ke li alparolu riproĉulojn en sia gepatra lingvo. Allan konsentis kaj kun tipa trankvileco diris kelkajn frazojn. Granda surprizo montriĝis sur iliaj vangoj, kiam ili aŭdis perfektan londonan slangon. Sen scipovo respondi ili silentiĝis kaj ĝis nia foriro nia grupo ĝuis ilian plenan respekton.

Malgraŭ tiu ĉi aventuro, la vespero estis tiel gaja, distra kaj amuza, ke certe ĉiu partoprenanto forportis belajn impresojn kaj neforgoseblajn rememorojn.

Bohumil Slezák

EĤO DE LA PRESO

Kvankam ni venas de diversaj landoj.. — (Svoboda 20.7.1967)

Belgo, Polino, Ruso, Svedo, Jugoslavo, Anglo, Nederlandano, Germano, Ĉeĥo - ĉiuj sidas konkorde ĉe la ovala tablo kaj perfekte komprenas unu la alian... kaj tamen eĉ unu el ili ne parolas per sia gepatra lingvo.

Tiel aspektis la Unua Internacia Esperanto-Seminario de gejunuloj -esperantistoj. La unua de sia spco ĉe ni okazinte, en belega valo ĉe torento de Turyň en Borek apud Jílové. Ĉi tie kunvenis ĉirkaŭ kvardek partoprenintoj. Pere da sia vere internacia lingvo ili konatiĝis kun laboro de esperantistoj, kun la kultura historio kaj estanteco de nia patrujo kaj ili akordiĝis je la fakto, ke ilia intereso por Esperanto ne estas nura memcela hobio. Anstataŭ ĉiuj eksterlandanoj esprimis ion la prezidanto de la Monda Junulara Esperanto-Organizo, jugoslavo Ivo Osibov, kiu diris: "Ĝi estas la unua seminario de junularo esperantista en via lando, tamen mi kredas, ke ĝi ne estas la lasta. Ĝi estis utila renkontiĝo kaj ni ĉiuj forveturos ne nur kun belegaj impresoj el socialisma Ĉeĥoslovakio, sed ankaŭ kun multaj valoraj spertoj por praktika realigo de

nia celo kontribui al pli bona interkompreniĝo inter la nacio kaj al ilia paca kunvivado."

Internacia seminario sen interpretistoj (Práce, 18.7.1967)

Dimanĉe finiĝis Internacia Junulura Esperanto-Seminario en Borel apud Jílové.

La Seminario sciigis la partoprenintojn pri kulturo, historio kaj ekonomio de Ĉeĥoslovaka Socialisma Respubliko. Ĉeestis ĝin gastoj el Pollando, Belgio, Rumanio, Nederlando, Jugoslavio, Sovetunio, Svedio, Germana Federacia Respubliko, Britio kaj Francio. Prelegis eminentaj ĉeĥoslovakaj kaj ankaŭ eksterlandaj esperantistoj. Ne mankis rondveturado tra Praha, vizito de la mondfama Materna magica kaj amikaj vesperoj ĉe tendarfajroj.

En junularo estas estonteco de la movado! Kun ĝojo mi devas konstati, ke aranĝo de IJES pruvis, ke tiu estonteco estas plenespera. Junularo aranĝis entreprenon, kiu povas servi kiel modelo por ĉiuj esperantistoj en ĈSSR. Mi deziras, ke vi daŭrigu tiun tiel bone faritan laboron.

Drahomír Kočvara
Ostrava
Ĉeĥoslovakio

DIVERSAJ VOĈOJ JE LA FINO DE IJES

Erika Schneider (Germanujo) laŭdas precipe la amikan atmosferon kaj ŝi bedaŭras pro ne taŭga germana reprezentanto

Elena Balanescu (Rumanio) bedaŭras, ke ne ekzistas tia movado ankaŭ en Rumanio. Kompare al Pécs, kie estis multaj krokodiloj, en Turyň estis atmosfero tute alia.

Andrej Valjan, kuracisto (Ĉeĥoslovakio) feliĉas, ke ne ekzistas ia grava akcidento.

TEJO AŬSPICIIS IJES

Humphrey Tonkin – ĝenerala sekretario de TEJO

"La ideo de la IJES, kiu okazos apud Praha, enkadriĝu en la serion de seminarioj por gvidantoj de TEJO, estas tre bona. Kiel estrarano pri edukado de gvidantoj, mi tuj donas mian konsenton kondiĉe – kompreneble – ke la aranĝo konformu kun la statuto de TEJO...

KIAL ILI NE VENIS?

La organizintoj tre bedaŭris nepartoprenon de reprezentantoj el la najbaraj Hungarujo kaj Germana Demokratia Respubliko kaj Aŭstrujo, kaj el Bulgario, Svislando kaj Italujo.

Sume, okaze de la Seminario, estis forsenditaj 17 leteroj kaj ricevitaj 93 leteroj kaj 34 telegramoj.

Ni aldonas al tiu ĉi numero de Zpravodaj unu specimenon de skribpapero kaj koverto kun la emblemoj de IJES.

ZPRAVODAJ SM ĈSEV – organo de Junulara Sekcio de Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato; speciala numero dediĉita al IJES 1967 – Ĉeĥoslovakio. Kompilis: la organiza komitato de IJES kaj estraro de JS ĈSE. Respondecas: Mikuláš Nevan. Lingva korekturo: Jaroslav Mařík. Praha marto 1968.

Administrado: Ústředí mladých esperantistů SM ĈSEV, Ječná 8, Praha 2

Centro de junaj esperantistoj de JS ĈSEK, Ječná 8, Praha 2.